1. ♗d5, ♔d4 2. ♙c3+, ♔d3 3. ♗e4++reg.



2…, ♔c5 3. ♗e3++
2…, ♔e5 3. ♕×g5++
1…, ♙c3 2. ♕×g5+, ♔d4 3. ♗e3++reg.
1…, ♙g4 2. ♕e4+, ♔f6 3. ♕e6++reg.
1…, ♕×h7 2. ♗c3+, ♔f5 3. ♕e4++
2…, ♔f4 3. ♕f3++
1…, ∼ 2. ♕e4+ aŭ ♗c3+, k.t.p.


♖a4 evitas dualon gravegan en la ĉefvarianto 1…, ♙c3, kiu povus esti solvata per 2. ♕e4+

Ia severega kritikisto opinios eble cenzurinda la uzon de la plej potenca peco nigra, la Damo, por krei unu varianton malgravan.


En tiu ĉi problemo, estas «eĥo» de koloro malsama. Vidu la mata-poziciojn regularajn produktatajn en la du unuaj variantoj.

Publikigita unuafoje en *La Stratégie*, Parizo 1908.

## 37



1. ♗c4, ♜a5 2. ♗d4+, ♚e4 3. ♗×d5++reg.



2..., ♚e6 3. ♗×d5++

1..., ♚e4 2. ♗×d5+, ♚e5 3. ♗d4++reg.


1..., ♔a6 2. ♗×d5+, ♔∼ 3. ♗d4++
1..., ♖×h6 2. ♕×d5+, ♔×f6 3. ♕×g5++reg.
1..., ♗×e3 2. ♘g4+,k.p.t.
1..., ∼ 2. ♗d4+ aŭ ♘g4+, k.t.p.

En la varianto 1..., ♔e6, Reĝo blanka evitas la dualon 2. ♗d4; ĉar Nigro, respondante 2..., ♗f4+, precizigas la movon 2. ♗×d5+.


En tin ĉi problemo oni vidas du matojn regularajn, egalajn, de koloro malsama, donatajn de unu Kuriero ŝirmata de la Damo: pro tie, ĝi estas simila al la antaŭa.

Publikigata unuafoje en tiu ĉi kolekto.

## 38




1. ♘e5, ♗×g8 2. ♘d7, ♘×c2 3. ♙e4 ++reg.



2..., ♘g5 3. ♖d4++
1..., ♘f4 2. ♘e7+, ♕×e5 3. ♙×f4++reg.
2..., ♕c5 3. ♘d7++
1..., ♕×e5 2. ♖a5+, k.t.p.
1..., ♘×c2 2. ♘f6+. k.t.p.
1..., ♘d3 2. ♘×d3, k.t.p.
1..., ♕c5 2. ♘d7+, k.t.p.
1..., ~ 2. ♘f6+ aŭ ♘d7, k.t.p.


♗g1 evitas tiun ĉi duasolvon: 1. ♘e7 aŭ f6+, ♕c5! 2. ♖a7 aŭ a8 kaj 3. ♖++. Nura defendo: 2..., ♗h2!

Reĝo blanka evitas dualon gravegan, kiu nuligus la ideon de la problemo, en la varianto 1..., ♘f4, kiu povus esti solvata per 2. ♘d7 plie 2. ♘e7+, se Nigro ne povus ŝaki per 2..., ♘e6+.


Estas eĥo de koloro malsama; la matoj estas donataj de Peono. En preskaŭ ĉiuj problemoj sekvantaj troviĝas tiu ĉi speco de matoj nomataj eĥoj.

Publikigita unuafoje en *La Strategie*, Parizo 1907.

## 39




1. ♖c4, ♗c1 aŭ d4 2. ♖d4, ♖×c2 3. ♘f3++reg.



2…, ♘×g5 3. ♙f4++reg.

1…, ♘×g5 2. ♗c7+, ♚d5 3. ♘×e3++reg.

2…, ♚f6 3. ♖f4++

1…, ♚d5 2. ♘×e3+, k.t.p.

1…, ♘c5 2. ♖×c5+, k.t.p.

1…, ♙g6 2. ♘×f7+, k.t.p.

1…, ∼ 2. ♘×f7+ aŭ ♗c7+, k.t.p.


♘a4 evitas la duasolvon: 1. ♖c5+; kaj ♙f7 dualon gravegan en la ĉefvarianto 1…, ♗c1 aŭ d4, kaj estas: 2. ♗c7+, k.c.

Sen ♙a3 la problemo estus nesolvebla pro 1…, ♖a3 defendante ♙e3.


Defendo nura: 1. ♗×h3, ♘c3 aŭ ♚d5!

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1907.

## 40



1. ♖×d5, ♔×d5 2. ♙d3, ♔×d4 3. ♕d6++reg.



2..., ♔e6 3. ♕c6++reg.
2..., ∼ 3. ♕d7++reg.
1..., ♔f3 2. ♕e7, ♘×d2 3. ♖f5++reg.
2..., ♘∼ 3. ♕e3++
1..., ♕×d2 2. ♖e5+, ♔f3 3. ♕f7 ++reg.
2..., ♔×d4 3. ♙c3++
1..., ♘∼ 2. ♕e5+, k.t.p.
1..., ♙×c2 aŭ ∼ 2. ♖e5+, k.t.p.


♙a7 evitas la duasolvon 1. ♕e5+; kaj la ♙a5 kaj ♙b6 evitas la 1. ♕e7+.

Defendoj nuraj: 1. ♕e7+, ♔×d4! 1. ♕f7, ♘×d2 aŭ f3!


La ŝlosilo estas malbona. Ĉiam estas tia la kapto de peco nigra, malgraŭ ke tie ĉi la difekto estas iom plimalgrandigata de la ofero de la Turo blanka.

Publikigata unuafoje en tiu ĉi kolekto.

## 41



1. ♗d2, ♘f6 2. ♘e6+, ♔e5 3. ♗f4++reg.




1..., ♕×b4 2. ♘×c6+, ♔c5 3. ♗×b4++reg.
1..., ♖×d3 2. ♕g4+, ♔e5 3. ♕f4++reg.
1..., ♘d6 2. ♘×c6+, ♕×c6 3. ♕h8++
1..., ♔e5 2. ♕e6+, k.t.p.
1..., ∼ 2. ♕g4+, k.t.p.


En tiu ĉi problemo la eĥoj estas de koloro egala. En la komenca pozicio, la ekzameno pri la eliro de la Reĝo nigra al c3, multege faciligas la solvon. Tio estas difekto kun sufiĉe da graveco.

Publikigata unuafoje en tiu ĉi kolekto.

# 42



1. ♕h2, ♗×f6 2. ♗×b7+, ♔e6 3. ♕h3++reg.



2..., ♔×d4 3. ♕×b2++reg.
1..., ♔×d4 2. ♕d6+, ♔c3 3. ♕×d3++
2..., ♔e4 3. ♗× d3++
1..., ♗×f8 2. ♕e5+, ♔c6 3. ♗b5++
1..., ∼ 2. ♕d6+ aŭ e5+, k.t.p.


Defendoj nuraj: 1. ♕g3, ♗×f6! 1. ♗×b7!, ♔×d4!

La ŝlosilo ne estas probleminda; ĝia difekto elvenas el la situacio de la Damo, kiu, kuŝinte en ĉelo malpotenca, estas transportata en lokon, de kie ĝi povas agi kontraŭ la Reĝo nigra. En


tiu ĉi okazo oni vidas ekzemplon de la ofta malfacileco trovi bonan ŝlosilon en la problemoj, kies ideo estas la kunigo de du aŭ pli mata-pozicioj. Oni konstruas tiajn verkojn ne atentante la ŝlosilon, kies serĉado estas la lasta laboro de la aŭtoro. Vidu ankaŭ la problemojn 40, 41, 44, 47, 48.

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1903.

## 43



1. ♕c7, ♘×h6 2. ♕d6+, ♔e4 3. ♗d3++reg.



2…, ♔c3 3. ♕d3++

1…, ♘×f1 2. ♕c4+, ♔e5 3. ♗f4++reg.

1…, ♔e4 2. ♕f4+, k.c.

1…, ♔d5 2. ♕c4+, k.c.

1…, ♘(f5) ∼ 2. ♕d6+, k.c.

1…, ∼ 2. ♕c4+, k.c.


♖e7 malebligas la movon 1..., ♘e7, kiu igus nesolvebla la problemon. Tiu Turo postulas la ♙d7.

Defendoj nuraj: 1. ♕c6, ♔e5! 1. ♙d8 (♕)+, ♖d7! kaj la ♗h8 evitas 2. ♕×f6++.


La ŝlosilo forprenas al la Reĝo nigra du ĉelojn liberajn; sed donas al ĝi du aliajn: estas, do, kompenso. Tiaj ŝlosiloj okazas sufiĉe ofte, kaj, kvankam ili ne estas tute bonaj, neniel oni povas kvalifiki ilin malbonaj.

Publikigata unuafoje en tiu ĉi kolekto.

## 44



1. ♕e7, ♘×e7 2. ♖×d7+, ♔e4 3. ♖×d4++reg.



1..., ♘d6 2. ♕×d6+, ♔×d6 3. ♖×d7++reg.
2..., ♔e4 3. ♕×d4++
1..., ♘×b5 2. ♕×d7+, ♘(b5)d6 aŭ ♘(c8)d6 3. ♕b7++
1..., ♖h6 2. ♕f7+, ♖e6 3. ♕×e6++
2..., ♔∼ 3. ♕aŭ ♖++
1..., ♙d6 2. ♕b7+. k.c.
1..., ♗c5 aŭ e5 2. ♕e5++
1..., ∼ 2. ♖×d7+, k.c.


♙b6 evitas 1..., ♘b6, kiu farus nesolvebla la problemon.

Defendoj nuraj: 1. ♗f5, ♘d6! 1. ♗×d7, ♔d6 aŭ ♘×b5!


La ŝlosilo estas malbona, ĉar la Damo proksimiĝas al la Reĝo nigra, kaj plie malebligas al tiu ĉi la iron al la ĉelo d6. Tiaj difekloj estas iom kompensalaj, ĉar la Damo sin oferas, kaj jam en la komenca pozicio oni vidas, ke se la Reĝo nigra irus al d6, la Turo ĝin matus tuj.

Publikigata unuafoje en tiu ĉi kolekto.

## 45



1. ♕c1, ♔d5 2. ♕e3, ♔c4 3. ♕b3++reg.



2..., ♙f6 3. ♕e6++

1..., ♔f6 2. ♕e1, ♔g5 2. ♕h4++reg.

1..., ♔e4 2. ♔d6, k.c.

1..., ♙f6 2. ♕e3+, k.c.


♙c6 evitas tiun ĉi dualon: 1..., ♙f6 2. ♔c6.

Defendoj nuraj: 1. ♕e2+, ♔f4! 1. ♕f1, ♙f6! 1. ♕×f7, ♔e4!


Pri la ŝlosilo vidu tion, kion oni diras en la solve de la problemo n-ro 43.

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1909.

# 46




1. ♖g3, ♖×g3 2. ♘d5, ♗d8! 3. ♙×g3, ♗∼ 4. ♘b6 aŭ c7++reg.




1..., ♗×g3 2. ♘d5, ♖b7! 3. ♙×g3, ♖∼ 4. ♘b6 aŭ c7++reg.
1..., ♖×e7 2. ♖g8+, ♖e8 3. ♖×e8+, k.c.
1..., ♗×e7 2. ♖×g7, k.c.
1..., ♖g5 2. ♘d5, k.c.
1..., ♗g5 2. ♘d5, k.c.
1..., ♖g6 aŭ g4 2. ♖×g6 aŭ g4 aŭ ♘d5, k.c.
1..., ∼ 2. ♖×g7 aŭ g8+ aŭ ♘d5, k.c.

Defendoj nuraj: 1. ♖×d6, ♗×e7! 1. ♖f3, ♗×e7 aŭ ♖g8!
Kunigo de du evolucioj similaj.
Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1906.

# 47



1. ♘d7, ♖a1 2. ♖×e4, ♖×a3 3. ♘b7, ♗×f3 4. ♘f6++reg.




1…, ♙e3 2. ♖×e3, ♗×f3 3. ♘b6+, ♔d4 4. ♘f5++reg.
2…, ♔d4 3. ♗c5+, ♔d5 4. ♖e5++
1…, ♔d4 2. ♖×e4+, ♔d3 aŭ c3 3. ♗b4, ∼ 4. ♘c5 aŭ e5++
2…, ♔d5 3. ♘b6 aŭ f6++
1…, ♗×f3 2. ♖d2+, ♔e6 3. ♘e8, ∼ 4. ♘g7++
1…, ∼ 2. ♖d2+ aŭ ♖×e4, k.c.

La ŝlosilo estas malbona, ĉar ĝi malhelpas la eliron de la Reĝo nigra al e5. Vane mi klopodis trovi alian ŝlosilon pli bonan: mi provis loki la Ĉevalon en f8, sed tion ĉi neebligis la jena duasolvo: 1. ♖d2+, ♔e5 2. ♘d7+, ♔e6 3. ♘e8, ∼ 4. ♘g7++.


En la nuna pozicio ne ekzistas tiu ĉi duasolvo, pro 1…, ♔e6! 2. ♘e8, ♙×f3! 3. ♘d7, ♔f5! kaj ne estas mato.

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1907.

# 48



1. ♗e3, ♔d6 2. ♗f7, ♔e7 3. ♖f5, ♔f8 4. ♗c5++reg.



3…, ♙c5 4. ♗×c5++reg.

3…, ♔d6 4. ♗c5++

1…, ♔f6 2. ♗g5+, ♔g6 3. ♙e3, ♔h5 4. ♗f7++reg.

1…, ♔f8 2. ♖f5+, ♔×g8 3. ♗c5, ♙e3 4. ♖f8++reg.

2…, ♔∼ 3. ♗c5 aŭ ♗f7, k.c.

1…, ♔e8 2. ♖f5, ∼ 3. ♗c5 aŭ ♗f7, k.c.


♙a3 evitas la jenan duasolvon: 1. ♖×c6 2. ♗a3 3. ♖f6 kaj 4. ♖f8++. Sen ♙e4, estus tiu ĉi duasolvo: 1. ♗b2, ♚d6! 2. ♗d4, ♚e7 3. ♗g7, ♚~ 4. ♖ aŭ ♗ ++. Sed estante ♙e4, oni evitas ĝin per 2..., ♙e3!

Estas sufiĉe da defendoj nuraj. Ekzemple: 1. ♖e5+, ♚f6! 1. ♖f5, ♙c5! 1. ♗f4, ♙e3! 1. ♗g5+, ♚d6! La ŝlosilo estas malbona, ĉar ĝi malhelpas la iron de la ♙e4.


Oni devas eviti, kiel eble plej, ĉian ŝlosilon, kiu plimalvastigas la agliberecon de la pecoj nigraj.

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1808.

## 49



1. ♘c4, ♙c5 2. ♙e4+, ♚d4 3. ♖f2, ♚d3 4. ♖d2++reg.




2..., ♔c6 3. ♖f8, ♔c7 4. ♖c8++reg.
1..., ♙e4 2. ♖f5+, ♔e6 3. ♖e5+, ♔f6 4. ♘e8++reg.
1..., ♔c5 2. ♖f5, ♔d5 3. ♖×e5++

♙a4 evitas dualon en la varianto 1..., ♙e4, kaj estas 2. ♙b3, kaj alian en la varianto 1..., ♔c5 kaj estas 2. ♙b4!


La ŝlosilo ne havas meriton, sed oni ne povas kvalifiki ĝin malbona.

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1908.

## 50



1. ♘f5, ♖×c3 2. ♖e4+, ♔d5 3. ♘b7, ♙×b5 4. ♘×e7++reg.



3…, ♗a3 4. ♘e3++
2…, ♔×f6 3. ♘d7+, ♔×f5 4. ♙g4++
2…, ♔×f5 3. ♙g4+ aŭ ♘d7, k.c.
1…, ♖×f2 2. ♘g7, ♖×f3 aŭ ~ 4. ♘d7++reg.
1…, ♗e3 2. ♘×e3, ♙b5 3. ♖d5+, ♔~ 4. ♖f5++
2…, ♔×f6 3. ♖e4, ~ 4. ♘d7++
2…, ♙×f6 3. ♙f4++
2…, ~ 3. ♖e4+, ♔d6 4. ♘b7++
3…, ♔×f6 4. ♘d7++
1…, ♙×b5 2. ♔g6, ♗h6 aŭ ♙×f6 3. ♘×e7, ~ 4. ♘c6++
2…, ♖×f2 aŭ ×c3 3. ♘d7+, ♔×e6 4. ♘g7++
1…, ♗a3 2. ♔g6, ♗×c5 3. ♙f4+, k.c.
2…, ♖×f2 3. ♘d7+, k.c.
1…, ♗f4 2. ♔g6, k.c.
1…, ♔×f5 2. ♖e4. k.c.
1…, ♔× f6 2. ♘g7, k.c.
1…, ♖e2 2. ♘g7 aŭ ♔g6, k.c.
1…, ~ 2. ♖e4+ aŭ ♔g6, k.c.

♗c1 evilas la jenan duasolvon : 1. ♙f4+, ♔×f6 2. ♖e4, k.c., kaj kelkajn dualojn, ekzemple: 1…, ♖×c3 2. ♔g6, ♖×c5 3. ♙f4+, k.c.


Sen ♙f6 la problemo estus nesolvebla, ĉar en la varianto 1…, ♖×c3 2. ♖e4+, ♔d5 3. ♘b7, Nigro, ludante 3…, ♗g5, malhelpus la maton.

Domaĝe ke unu el la du mala-pozicioj regularaj estas produktata en varianto mallonga, ĉar tiuj ĉi havas malpli da merito ol la longaj, t. e., tiuj, kiuj enhavas la saman nombron de movoj, kiel la problemo.

Publikigita unuafoje en *Deutsche Schachzeitung*, Leipzig 1909.

# FANTAZIAJ PROBLEMOJ

## 51




Antaŭ ol Blanko ludis, estis Kuriero nigro ĉe d8, kaj la Turo blanka d8 kuŝis en e8.

Blanko ludis ♖e8×d8. Por matiĝi, ĝi devis ludi: ♔e5—f4, kaj Nigro nepre estus respondinte: ♝d8×c7++.

Publikigita unuafoje en *La Ilustración Artistica*, Barcelona 16 Marto 1896.

# 52




Antaŭ ol Blanko ludis, ĝia Damo kuŝis en a4, la Kuriero nigra ne ekzistis, kaj estis Peono nigra en e2.

Blanko ludis ♕a4 — d1, kaj Nigro respondis ♙e2 × d1 (♗)++. Blanko povis ludi ♕a4 — f4++.

Publikigita unuafoje en *La Stratégie*, Parizo 1895.

# 53




Antaŭ ol Blanko ludis, ĝia Reĝo kuŝis en a4, la Ĉevalo nigro c5 estis en b3, kaj plie ekzistis la Dame blanka en c5.

Blanko ludis ♔a4 — b5, kaj Nigro respondis ♘b3×c5++. Blanko povis ludi ♕c5 — a3++.

Publikigita unuafoje en la angla gazeto *Brighton Society*, 28 Majo 1898.

## 54




Antaŭ ol Blanko ludis, ĝia Reĝo kuŝis en e4, ne ekzistis la Turo nigra f1, kaj estis Peono nigra en g2 kaj Turo blanka en f1.

Blanko povis ludi ♗e6 — c4++; sed ludis ♔e4 — f5, kaj Nigro respondis ♙g2 × f1(♖)++.

Sen ♙c6 estus la jena duasolvo: oni loku la Damon blankan ĉe e1, kaj la Reĝon nigran ĉe f3. Blanco povis ludi ♗e6 — d5++ sed ludis ♕e1 — e2+, kaj respondinte Nigro ♔f3×e2 oni havis la diagraman pozicion.

Publikigita unuafoje en *Brighton Society*, 9 Julio 1898.

# 55



La pozicio estas neebla; ĉar, deduktante ĝin el la komenca pozicio de la ŝakludado, ne estos eble alvenigi la Reĝon nigran en a2. Unue, do, oni devas ebligi la pozicion; por tio, estas la diversaj rimedoj jenaj:


1. Depreni ♙b2 aŭ ♙c2 aŭ ♙d2.
2. Depreni ♗c1.
3. Ŝangi de loko la Reĝon nigran.

La du unuaj rimedoj ne taŭgas, ĉar oni ne povos mati per unu movo. La tria solvas la problemon. Sed, ne estante eble scii la lokon okupitan de la Reĝo nigra, oni devas meti ĝin en la ĉelojn, kie ĝi povas esti. Tiel:

Reĝo nigra en a8, b8, b7, c8...... 1. ♖e4 — e8++
" " f8 ............. 1. ♕d3 — d8++
" " g8 ............. 1. ♖e4 — e8++
" " c6 ............. 1. ♖e4 — e5++
" " c5 .............. 1. ♖h7×c7++
" " a4 ............. 1. ♙b2 — b3++
" " g6 ............. 1. ♖e4 — e6++
" " f2 ............. 1. ♕d3 — e2++
" " h1 ............. 1. ♔h3 — g3++

Publikigita unuafoje en la revuo *Ruy López*, Barcelona, Septembro-Oklobro 1896.

# 56




Ekzamenante la diagramon oni trovas neklarigebla la situacion de la Kuriero nigra ĉe d6: ĝi ne estas la Kuriero de la komenca pozicio de la ŝakludado, ĉar la Peonoj e7 kaj g7 estas en siaj lokoj. Nek ankaŭ ĝi povis deveni el Peono nigra alveninte al ĝia oka ĉelo, ĉar la tri Peonoj nigraj, mankantaj en la pozicio, havas siajn okajn ĉelojn de koloro blanka, kaj plie ili ne povis esti kaptintaj iajn pecojn blankajn, ĉar la nura, kiu mankas el tiuj ĉi, taŭgas por klarigi la situacion de la Peono nigra ĉe g2.

Sekve, por ebligi la pozicion, oni devas depreni la Kurieron d6 aŭ meti ĝin ĉe f8.


Farinte tion, la solvo estas: 1. ♕g3 — b8, ♕b7×b8++.

Publikigita unuafoje en la angla gazeto *The Leeds Mercury, weekly supplement*, 10 Decembro 1898.

# 57



Estas nigraj la pecoj ♖a8, ♗d5, ♗e7, ♙f2, kaj blankaj la ceteraj. La Reĝo blanka devas esti lokata en c7, kaj la nigra en c5. Sekve, rezultas la jena diagramo:



Nun, la solvo estas tre facila.

1.


Blanko: 1. ♕×f2++. Nigro: 1..., ♗d8++

2.

Blanko: 1. ♕d6+, ♗×d6++. Nigro: 1..., ♗d6+ 2. ♕×d6++.

Publikigita unuafoje en *The Leeds Mercury, weekly supplement*, 8 Decembro 1900.

## 58




Antaŭ ol la pozicio de la diagramo formiĝis, estis Ĉevalo nigra ĉe e8, Peono blanka ĉe d7, kaj ne ekzistis la Kuriero blanka e8.

Blanko ludis ♙d7×e8(♗)+, kaj anstataŭ tio, povis ludi ♖g7 — g5++.

Rimarko. La peco nigra ĉe e8 estis ĝuste Ĉevalo.

Publikigita unuafoje en *The Leeds Mercury*, Decembro 1903.

## 59



La pozicio estas neebla kaj oni devas ĝin korekti.

Ekzamenante ĝin atente, oni vidos, ke la ŝako nur povis esti ♙e7 — e6, kaj ke Blanko respondis ♔d5 — d4. Efektive, la ŝako ne povis esti ♙d7 × e6 nek ♙f7 × e6, ĉar la situacio de la Peonoj nigraj montras, ke ili faris naŭ kaptojn de pecoj blankaj, kiuj, kun la sep pecoj ekzistantaj, sumiĝas dekses. Sekve, la ŝako estis donata sen kapto, kaj la ♙e6 estis ĉe e7.


Plie, la Kuriero nigra a3 ne elvenas el la promocio de ia Peono nigra, ĉar ekzistas ĉiuj tiuj ĉi. Tial, oni devas korekti la pozicion per la transloko de la ♝a3 al f8, el kie ĝi ne povis esti elirinta.

Aliparte, sidante la Kuriero en f8 kaj ekzistante la Peonoj g7 kaj h7, la Turo h8 ne povis esti elirinta el sia ĉelo. Nek ankaŭ la Turoj devenos de Peonoj alvenintaj al siaj okaj ĉeloj, pro la sama kialo montrita antaŭe. Sekve, oni loku ian ajn Turon nigran ĉe h8, kaj oni havos la veran pozicion, kiam Nigro donis Sakon.

Tiam, la solvo estas tre videbla. Anstataŭ ♔d5 — d4, Blanko povis ludi ♕g6×e6++.

Publikigita unuafoje en *The Leeds Mercury*, Decembro 1903.


## 60




La ŝakludado elpensata de la aŭtoro estas la jena:

**1. d4, b5** **2. ♘f3, b4** **3. g3, b3**
**4. h4, b×a2** **5. b4, e5** **6. b5, ♗a3**
**7. ♘h2, ♗×c1** **8. ♕×c1, h6** **9. ♕×h6, ♔e7**
**10. ♕×h8, ♔e6** **11. ♕×g8, ♔d5** **12. c4, ♔×c4**
**13. e4, ♔b3** **14. ♕×d8, ♔b2** **15. ♕×c8, ♔×a1**
**16. ♕×b8, d5** **17. ♕a7, ♖×a7** **18. ♗e2, c5**
**19. ♗d1, f5** **20. ♘f1, g5** **21. h5, ♖e7**
**22. e×d5, c4** **23. d6, e4** **24. d5, f4**
**25. ♘c3, f3** **26. ♘a4, ♖e5**

Kaj rezultas la diagrama pozicio.



La maton oni atingas tiel:

1. ♘d2, ♙e3 2. ♗e2, ♙×d2+ 3. ♔×d2++

2..., ♙×f2+ 3. ♘×f2++

2..., ~ 3. Reĝsalto ++

1..., ♙c3 2. ♗c2, k.c.

1..., ♖× d5 2. ♗b3, k.c.

1..., ~ 2. ♗c2 aŭ b3 aŭ Reĝsalto, k.c.

Publikigata unuafoje en tiu ĉi kolekto.

# 04

# VORTARETO

## DE LA ŜAKVORTOJ UZATAJ EN TIU ĈI VERKO[1]

Rimarko. Oni devas akcepti provizore ĉiujn tiujn ŝakvortojn, car ankoraŭ ne estas farata la definitiva oficiala teknika vorlaro pri ŝakludo.

El tiuj ŝakvortoj, la aŭtoro elpensis iujn, kaj aliaj estas prenitaj el kelkaj ĵurnaloj esperantistaj.

Post la esperante vorto, la unua sekvanta estas hispana, la dua itala, la tria franca, la kvara angla, la kvina germana.

**Blanko.** las Blancas. | il Bianco. | les Blancs. | White. | Weiss.

**blokado.** bloqueo. | blocco. | blocus. | block. | Zugzwang.

**ĉefludo.** juego principal. | variante capitale. | variante principale. | main-play. | Hauptspiel.

**ĉefvarianto.** variante principal. | variante principale. | variante principale. | main variation, principal variation. | Hauptvariante.

**ĉelo.** casilla. | casa. | case. | square. | Feld.

**Ĉevalo.** Caballo. | Gavallo. | Cavalier. | Knight. | Springer.

**Damo.** Dama o Reina. | Donna o Regina. | Dame. | Queen. | Dame.

[1] Tiu ĉi vortareto, eble la unua pri ŝako en Esperanto, kiel la rilata libro, estas pli ol 110 jaraĝa. Ni ne intencis ĝisdatigi ĝin pro la minaco ruinigi la enhavon aŭ la koherecon de la verkado. Oni povas konsulti fakajn vortojn pri ŝako en la retejo «Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko» (www.eventoj.hu/steb/).

Enciklopedio de Esperanto (1934) diris pri tiu ĉi libro, ke ĝi havas «bonan fakan vortaron kvinlingvan».

**defendo.** defensa. | difesa. | défense. | defence. | Verteidigung.

**dualo.** dual. | doppia continuazione, doppia mossa. | double coup. | dual. | Doppelzug.

**duasolvo.** doble solución. | doppia soluzione. | double solution. | second solution, cook. | Nebenlösung.

**dumova problemo.** problema en dos jugadas. | problema in due mosse. | probleme en deux coups. | two-move problem, two-mover. | Problem in zwei Zügen, Zweizüger.

**ekludi.** empezar a jugar, ser mano. | cominciare il giuoco, avere il tratto o la mano. | jouer le premier, avoir le trait. | to move first. | den Anzug haben.

**eldiro.** enunciado (de un problema). | enunciazione, enunciato. | énoncé. | enunciation. | Forderung.

**fantazia problemo.** fantasía. | bizzarria. | fantaisie, composition fantaisiste. | puzzle. | Scherzproblem, Kalauer.

**interfiksi.** intercluir, (interceptar). | inchiodare. | clouer. | to pin. | fesseln.

**kapti.** tomar, capturar. | prendere. | prendre. | to capture, to take. | nehmen, schlagen.

**kapto.** captura. | cattura, presa. | prise. | capture. | Schlagen, Nehmen.

**kolono.** columna (del tablero). | colonna, linea verticale. | colonne. | file. | Reihe.

**komenca pozicio.** posición inicial. | posizione primitiva o iniziale. | position initiate. | initial position. | Anfangsstellung.

**Kuriero.** Alfil. | Alfiere. | Fou. | Bishop. | Laufer.

**mata-pozicio.** cuadro de mate. | posizione di matto, quadro di matto. | tableau de mat. | mating position. | Matstellung, Matbild.

**mati.** dar mate. | dare matto, dare scaccomatto, mattare. | donner le mat, faire mat. | to give checkmate, to mate. | Mat machen, matsetzen.

**matiĝi.** hacerse dar mate. | farsi dar matto. | se faire donner le mat. | to self-mate. | sich selbst matsetzen.

**mato. (*)** mate, jaquemate. | matto, scaccomatto. | mat, échec et mat. | mate, checkmate. | Mat, Schachmat.

**minaci.** amenazar. | minacciare. | menacer. | to threaten. | drohen.

**minaco.** amenaza. | minaccia. | menace. | threat. | Drohung.

**movo.** jugada. | mossa, tratto. | coup. | move. | Zug.

**multobla problemo.** problema múltiple. | problema molteplice. | probleme à solutions multiples. | multiple problem. | mehrfaches Problem.

**nesolvebla.** insoluble. | insolubile. | insoluble. | unsolvable. | unlösbar.

**nesolvebleco.** insolubilidad. | insolubilità | insolubilité. | unsolubility. | Unlösbarkeit.

**Nigro.** las Negras. | il Nero. | les Noirs. | Black. | Schwarz.

**oferi.** sacrificar. | sacrificare. | sacrilier. | lo sacrifice. | opfern.

**ofero.** sacrificio. | sacrifizio. | sacrifice. | sacrifice. | Opfer.

**partio.** bando, es decir, cada uno de los dos grupos que luchan en la partida. | parte. | camp, armée. | party, side. | Partei.

**peco.** pieza. | pezzo. | pièce. | man, piece. | Stein, Figur.

**Peono. (**)** Peón. | Pedone. | Pion. | Pawn. | Bauer.

**pozicio.** posición. | posizione. | position. | position. | Stellung.

**protoleminda.** digno de problema o característico del problema. | degno di problema. | digne de problème. | worthy of problem. | problemwürdig, problemwert.

**problemo.** problema. | problema. | problème. | problem. | Problem, Aufgabe.

**promocio.** promoción o coronación de un Peón al llegar a la última fila. | promozione o trasformazione di un Pedone giunto alia ottava casa. | trasformation d'un Pion arrivé à la huitième case. | promotion, or queening a Pawn. | Umwandlung eines Bauern.

**pura.** puro. | puro. | pur. | pure, clean. | rein.

**regulara mato.** mate reglamentario, es decir, puro y económico. | matto puro ed economico. | mat réglementaire, c'est-à-dire, pur et écouomique. | model-mate, or pure and economical mate. | reine und ökonomische Matslellung.

**Reĝo.** Rey. | Re. | Roi. | King. | König.

**reĝsalto.** enroque. | arroccamento. | roque. | castling. | Rochade.

**rekta problemo.** problema directo. | problema diretto. | problème direct. | direct-mate problem. | direktes Problem.

**Skolo.** escuela. | scuola. | école. | school. | Schule.

**solvi.** resolver. | risolvere. | résoudre. | to solve. | lösen.

**solvo.** solución (de un problema). | soluzione. | solution. | solution. | Lösung.

**ŝakfako.** sección o columna de ajedrez (de un periódico). | rubrica scacchistica. | colonne d'échecs (dans un journal). | chess column. | Schachspalte.

**ŝaki.** dar jaque. | dare scacco. | donner échec. | to give check, to check. | Schach geben, Schach bieten.

**ŝakludado.** partida de ajedrez. | partita di scacchi. | partie d'échecs. | game. | Partie.

**ŝakmajstro.** maestro de ajedrez. | maestro di scaechi. maître d'échecs. | master of chess. | Meister des Schachspiels, Schachmeister.

**ŝako.** jaque. | scacco. | échec. | check. | Schach.

**ŝakproblemisto.** compositor de problemas de ajedrez, problemista. | compositors di problemi di scacchi, problemista. | compositeur de problèmes d'échecs, problémiste. | problem composer, problemist. | Problemkomponist.

**ŝakproblemo.** problema de ajedrez. | problema di scacchi. | problème d'échecs. | chess problem. | Schachproblem, Schachaufgabe.

**ŝaktabulo.** tablero de ajedrez. | scacchiera. | échiquier. | board, chessboard. | Brett, Schachbrett.

**ŝlosilo.** primera jugada (de la solución de un problema). | prima mossa, chiave di matto. | premier coup. | first move, key-move. | Anfangszug, Einleitungszug.

**ŝparema.** económico. | económico. | économique. | economical. | ökonomisch.

**ŝparemo.** economía. | economia. | économie. | economy. | Ökonomie.

**tempo.** tiempo. | tempo. | temps. | time. | Tempo.

**trankvila minaco.** amenaza tranquila, o sea sin jaque. | minaccia tranquilla, o senza scacco. | menace tranquille, ou sans échec. | quiet threat. | stille Drohung.

**trimova problemo.** problema en tres jugadas. | problema in tre mosse. | problema en trois coups. | three-move problem, three-mover. | Problem in drei Zügen, Dreizüger.

**Turo.** Torre. | Torre. | Tour. | Rook. | Turm.

**varianto.** variante. | variante. | variante. | variation. | Variante.

**vico.** fila (del tablero). | linea orizzontale. | rang, rangée. | rank. | Reihe.

(*) Se oni rifuzus la vortojn «mato, mati», ĉar la unua jam eslas uzita por traduki la vortojn *natte* (fr.), *mat* (ang), *Matte* (germ.), k.t.p., la aŭtoro proponas antaŭmeti la literon Ŝ, tiel: «ŝmato, ŝmati», kiuj estas mallongigoj de «ŝakmato, ŝakmati». Neniel li povas akcepti la vorton «mortigi» anstalaŭ «mati», pro tio, ke la unua elvokas ideojn funebrajn, kies enmiksiĝo, dum la animo ĝuas la ludan plezuron, ŝajnas iom malsaĝa kaj neĝusta.

(**) La aŭtoro ne akceptas la vorton «soldato» proponitan de aliaj, ĉar krom tio ke ĝi havas ŝajnon de participo, ĝi jam taŭgas por esprimi homon militantan. La vorto «Peono», tre internacia, povas esti utiligota en aliaj tabulaludoj kiel damludo, sieĝludo, k.t.p. Kial ne krei apartan vorton por signifi objeklon tiel karakterizan en tiuj ludoj, kiel la Peono?

# 05

# LASTA PAROLO

El la personoj, kiuj pli bezonas lingvon internacian, aŭ kies uzadon ili nepre ne povas rifuzi, oni trovas la emulojn al iaj maloftaj specialaj gustoj inteleklaj aŭ artistaj aŭ nur amuzaj, de ne tro ĝenerala karaktero.

Kompreneble, precipe pro tio ĉi lasta, aŭ pro sia trolima celo, tiaj gustoj ne algajnas la simpation de la amasoj. La sindonantoj al ia ajn el tiaj gustoj aŭ specialaĵoj estas dissemitaj en la tula mondo, kaj entute, ili estas kelkaj miloj; sed, intencante kolekti ilin laŭ nacioj, en ĉiu el tiuj ĉi apenaŭ oni ilin kalkulus po centoj. En grandaj urboj ordinare loĝas la plej gravaj anaroj de tiuj sindonantoj; la ceteraj estas izolitaj, tie ĉi kaj tie, en diversaj urbetoj kaj vilagoj. Nature, tia dissemata homamaseto parolas multegajn diversajn lingvojn.

El tiu stato sekvas, ke ĉiu revuo aŭ libro traktante ian objekton rilatan al tiuj gustoj havos nepre tre malfortan vivon; ĉar, videble, la tutmonda publiko ne interesiĝas al la aĉetado de tiuj verkoj, pro tio, ke ili ne estas publikigitaj en lingvo internacia, kiel okazas nuntempe. Tial, multafoje tiaj verkoj nur povas esti eldonataj per helpo de unu Mecenaso.

---

Pri tio ĵus dirita, ekzemplon tre rimarkindan oni trovas en ŝakludo. Ĉiuj amatoroj de la literaturo de tiu ĉi interesega amuzaĵo estas suferontaj la malbonajn sekvojn el neuzado de lingvo al ili komuna, taŭganta ĉu por ilia interrilato, ĉu por komprenigi la verkojn.

En la daŭro de unu jaro ĉirkaŭe, estis publikigitaj, plie aliaj, la jenaj verkoj: «Kolektoj de ŝakproblemoj» de Dobrusky (boheme), de Ewetzky (ruse), de Schuster (hungare), de Pospisil (germane kaj angle), de Geijersstam (svede), «Kolekto de ŝakludfinoj» de Rinck (France kaj germane), kaj «Rimarkoj kritikaj pri la an-

taŭa Rincka verko», de Puig (hispane). Resume: 7 verkoj kaj 8 lingvoj diversaj.

Ĉiuj tiuj ĉi libroj estas tiel bonegaj kaj interesa], ke ilian legadon ne devas rifuzi kiuj deziras koni la vastiĝon kaj progresojn de ŝakludo.

Sed, malebligas bonkompreni ilian enhavon, la jena grandega baro: diverseco de lingvoj; tiamaniere, ke se ne okazus, ke en ili estas diagramoj prezentantaj poziciojn de problemoj, kaj plie, ke estas tre komprenebla la notasistemo de la movoj (oni observu, pasante, ke iamaniere tio ĉi estas ekzemploj de lingvo tutmonda), la plimulto da amatoroj ne ekintencus aĉeti iun el tiuj verkoj. En urbo granda, oni povas facile nuligi tian malutilon aŭ diversecon, ĉar tie loĝas multaj tradukistoj el la lingvoj plej konalaj, kaj plie ne estas tute neeble trovi iun, kiu scias eĉ la malplej disvastigatajn; sed, en urbetoj aŭ vilagoj, kion faros la amatoroj?

Por eviti tiom da malfacilaĵoj, kelkaj aŭtoroj, speciale la senlaca kaj tre inteligente usonano S-ro Alain G. While, uzas la rimedon skribi per du aŭ tri lingvoj (franca, angla, germana) la literaturan parton de siaj verkoj; sed kia enuiga, kia kara, kaj precipe, kia absurda estas tia laboro nuntempe, kiam ekzistas la genia elpenso de D-ro Zamenhof, la mirinda Esperanto, kiu ŝajnas esti kreita nure kaj intence por tiuj, kiuj ŝatas la diritajn guslojn de limigita karaktero!

Eble iu diros, ke ĉiuj ŝakverkoj povus esti verkitaj en unu sola eŭropa lingvo, ekzemple, la franca, aŭ la angla, aŭ la germana. Sed, kiom da tempo estas necese por scii skribi korekte iun ajn el tiuj lingvoj! Kelkajn jarojn. Male, oni povas jesi, sen trograndigo, ke Esperanto estas bone sciita post malmulte da semajnoj okupitaj serioze pri ĝia lernado. Kiu dubos la eleklon? Kaj oni ne prezentu kiel kontraŭparolon, ke Esperanto estas malmulte disvastigata. Tio ĉi estas eraro: hodiaŭ en la mondo oni eldonas

81 revuojn aŭ jurnalojn Esperante[1], funkciadas 1311 Esperantistaj societoj[2], ĝia bibliografio en Majo 1908 atingis la sumon de 1133 verkoj[3], kaj fine, oni povas supozi ke la nombro da homoj konantaj kaj praktikantaj ĝin estas cirkaŭe duonmiliono, nombro kiu kreskadas senĉese ĉie kaj iam post iam.

Por tin lingvo oni estas farinte multajn aliajn argumentojn, kiujn, pro mallongigo, mi ne ripetas tie ĉi.

Kiel resumo de ĉio, kio estas dirita, ni povas formuli la jenan regulon, kiu, pli aŭ malpli baldaŭ, regos la tutan literaturan produktaron:

*Ĉiu verko de tutmonda karaktero, aŭ povonta interesila landanojn de du aŭ pli nacioj, devos esti redaktita Esperante, —aŭ, se oni volas uzi en ĝi la patrolandan lingvon, oni devos aldoni ĝian tradukton Esperantan.*

Malmulte mi diros pri la interrilatoj inter ŝakamatoroj. Oftege ilia korespondado nun estas farata per alilanda lingvo, kiu ordinare estis duone aŭ tre surface lernita. Sekve, iliaj leteroj enhavas grandan kvanton da frazoj nekompreneblaj aŭ malbone konstruataj, kio malfaciligas kaj malfruigas la antaŭenirado de ilia favorata amuzaĵo.

Kaj plie, la tempo (ĉiam tro granda kompare al liu, kiun postulas Esperanto) uzata por lerni lingvojn[4] estas ŝtelata de la amatoro el sia preferata pasio, el siaj specialaj ŝatoj.

Mi kredas neutile insistadi pli pri tiu afero, ĉar ĝi estas tia, ke ĝia sola elmontro sufiĉas por konvinki iujn ajn

[1] Laŭ «Internada Scienca Revuo» Majo 1909.

[2] Laŭ gazeto «Esperanto» 20 Marto 1909.

[3] Laŭ katalogo de la Biblioteko de S-ro Georg Davidov, Saratov (Ruslando); ne kalkulinte katalogojn, kalendarojn, musikverkojn, k.t.p.

[4] Pro tio, ke nuntempe Usono, Angla- kaj Germanlando estas la nacioj, en kiuj oni produktas plej multe kaj plej bone pri ŝakludo, nenia vera amatoro povas rifuzi lerni la du respektivajn lingvojn.

pri la antaŭaj jesoj.

Do mi finas esprimante varmegan deziron havi multajn imitontojn, tiamaniere ke tre baldaŭ ekzistu, en Esperanto granda amaso da ŝakverkoj, originalaj kaj tradukitaj, kaj plie, ke eslu publikigita Esperante bona ŝakrevuo, en kiu kunlaboros ŝakistoj de la tula mondo.

Kaj en la minuto en kiu mi vidas finita la nunan laboren, korplezure mi esprimas la plej veran dankecon al la fama esperantisto kataluna S-ro Frederiko Pujulá Vallés, sen kies grava kunhelpo mi ne estus povinta eldoni Esperante mian modestan kolekton de ŝakproblemoj.

J. PALUZiE

Tiu ĉi verko, la unua redaktita en Esperanto pri ŝakludo, publikiĝis ĉe «Filoj de Paluzíe», eldonistoj kaj presistoj en la kataluna urbo Barcelono, strato Diputació, nº 337. La presado estis finita en 12ª de Junio 1909.



(Faksimila paĝo)

KRATERO